Starpunkto de ILEI pri la Ukraina ILEI-Sekcio ULEI

Post longaj esploroj kaj multaj kontaktoj aperas jena situacio :

Okaze de la 20-a Kongreso de Ukraina Esperanto Asocio UkrEA en Kievo je la 30-an de novembro 2014 estis decidita eksigo el la Asocio de Sinjoro Volodimir Hordijenko. La kialoj jenas : kaŝo aŭ rifuzo de redono de multaj dokumentoj gravaj, kiuj koncernas la vivon de la Asocio. Ne sekvo de informfluo al la Ŝtato (administraj kaj financaj raportoj), kio gvidis al perdo de la agnosko de la Asocio fare de la Ŝtato. Tiu eksigo estis konfirmita okaze de la 21-a Kongreso de UkrEA en Kievo la 28-an / 29-an de novembro 2015.

El tio ILEI konsideras, ke Sinjoro Hordijenko ne povas esti sekciestro de ULEI, la Ukraina ILEI-sekcio.

La sekciestro de ULEI estas D-ino Nina Danylyuk.

La du komitatanoj de ULEI en la Komitato de ILEI estas D-ino Nina Danylyuk kaj Euheno Kovtonjuk.

Pro manko de informoj aperis en IPR 2016/1 la nomo de Sinjorino Pogorelaja kiel sekciestro de ULEI bedaŭrinde.

Mireille Grosjean

2016-09-14